

Heinrich Heine,
Lorelej'

*tradukita de Leopold
Elb*

*Tiu traduko estas po-
ste iom modifita de ali-
uloj, ne estas la origina
traduk-versio de Leopold
Elb.*

Ne scias mi, kial mi
estas
Malgaja en la kor'.
Antikva fabelo restas
Por ĉiam en mia me-
mor'.

Vespero jam ekmalhe-
liĝas,
Fluadas la Rejn' en
trankvil',
La supro de l' monto
lumiĝas
En vespersuna bril'.

Belega knabino jen
tronas
Kun ora juvelar',
La belan vizaĝon kro-
nas
Mirinde la ora harar'.

Ŝi uzas kombilon el oro
Kaj dume kantas ŝi.
Mirige tuŝas al koro
Sorĉiga la melodi'.

...

Heinrich Heine,
Lorelej

*tradukita de Ludwig
Lazarus Zamenhof*

Ne scias mi, kial subita
malgaj' en la koro na-
skiĝis;
el tempo jam enterigita
legendo al mi reviviĝis.

Jam malvarmetiĝas l'
aero,
la Rejno mallaŭte ba-
bilas,
per oro de l'sun' en
vespero
la supro de l' monto re-
brilas.

Plej belan knabinon mi
vidas:
en ora ornamo brilan-
te,
sur supro de l' monto ŝi
sidas,
la harojn mistere kom-
bante.

La oran kombilon ŝi
movas
kaj kantas tra l' pura
aero,
kaj forto mirinda sin
trovas
en tiu ĉi kant' de
l'vespero.

...

Heinrich Heine,
Lurleia

tradukita de N. N. 01

Ignoro, quid id sibi
velit,
Tristissimus cur sim,
Antiqui aevi fabellam
Cur saepe volverim.

Vesperascit et friges-
cit,
Et Rhenus leniter it,
Cacumen montis lu-
cescit,
Dum Phoebus occi-
dit.

Sedet in summo mon-
tis
Virgo pulcherrima,
Auro nitet gemma
frontis,
Se pectit auricoma.

Aureolo pectine pec-
tit,
Carmen canens pro-
cul,
Mirandum id habet
modum
Nec non virilem si-
mul.

...

Heinrich Heine,
Lorelejo

*tradukita de Joachim
Gießner*

Malgajon mi sentas en
koro,
sed kial tia tim'?
Legendo el pratempa
foro
Vagadas tra mia anim'.

Jam fluas la Rejn' en
malhelo,
kaj malvarmetas l' aer'.
Sed brilas la mont' en
orbelo
pro suna lum' de l' ves-
per'.

Jen supre kabino pro-
vokas
per ora juvelar',
kaj ŝia beleco allogas
kaj ŝia ora harar'.

Ŝi kombas ĝin, kantas
sorĉige,
sirene kantas ŝi
per neimagebla, mirige
potenca melodi'.

...

<p>Kaj sopiregon eksentas Ŝipisto dum sia vetur’; Rifaron li ne priatentas, Al monto rigardas linur.</p>	<p>Ŝipet’ iras sur la rivero, ŝipisto ektremis de l’ kanto, kaj blinda por ĉiu danĝero rigardas li al la kantanto.</p>	<p>In cymba navitam mille Angores feri tenent, Non videt scopulos ille, Ocli non si sursum vident.</p>	<p>Ŝipiston en eta boato Turmentas koremoci’. Ne ĝenas lin rifo- kaskado, rigardas nur supren al ŝi!</p>
--	--	--	--

<p>Mi kredas, ke dronos finfine Ŝipisto kun sia boat’, Kaj tion kaŭzis feine La Loreleja kantad’.</p>	<p>Ha, baldaŭ ŝipisto la bela perdiĝis sub l’ akvotur- nado; ĝin Lorelej’ faris krue- la, per sia mirinda kanta- do.</p>	<p>Opinor undas devorare Nautam cum navicula, Effecit solo canendo Lurleia id dea.</p>	<p>Ĝis tiras kun si al Rejn- fundo la ondoj lin kun boat’. Nun kuŝas li en la pro- fundo pro Loreleja kantad’.</p>
---	--	--	--

*Traduko de la Germana poemo “Die Lorelei” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de LEOPOLD ELB (†1912-08.04).*

Arg-2-71 (2005-02-03 19:06:30)

La traduko troviĝas sur paĝo 84 de la lernolibro „Post la kurso“ de Wilhelm kaj Hans Wingen, eldonita de Ludwig Pickel en Nurembergo (Nürnberg), Germanio.

*Traduko de la Germana poemo “Die Lorelei” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazarus Zamenhofo, *1859-12-15 – †1917-04-14).*

Arg-2-565 (2009-10-30 16:15:09)

Tiun ĉi tradukversion mi prenis el retejo <http://www.esperanto.mv.ru/Kolekto/Lorelej.html>.

*Traduko de la Germana poemo “Die Lorelei” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en la Latinan de N. N. 01.*

Arg-2-179 (2010-02-11 14:00:52)

*Traduko de la Germana poemo “Die Lorelei” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 – †2003-11-25).*

Arg-2-1115 (2010-09-15 12:51:51)

Tiu ĉi poem-traduko aperis en la kant-kolekto “Mia kantaro I”, eldonita de Josef Schiffer (Wilstorfstr. 58, D-78050 Villingen-Schwenningen, Germanio, tel. 0049(0)7721-58991; faks. 0049(0)7721-508891, ret-adreso: Josef.Schiffer@t-online.de), n-ro 30. Krome ĝi aperis en la informilo “Fervoja Esperantisto” de Germana Ferjojista Esperanto-Asocio, n-ro 3/2010, sur paĝo 3.